★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Esperanto-Simpozio en Gherla (Rumanio)

**Prelegos:** Oldřich Arnošt Fischer

En la jaro 2018 mi partoprenis en somera esperantista renkontiĝo, kiu Esperanto-Asocio de Rumanio (EAR) aranĝis en rumana urbeto Gherla [gerla]. Poste malbona epidemiologia situacio (pandemio de infekta malsano, kies kaŭzanto estis ĉinia kronviruso) aranĝon de similaj agadoj ne permesis. Pro tio en tiu ĉi jaro mi volis partopreni en Esperanto-Simpozio en Gherla (27 – 29 oktobro 2023), por denove renkontiĝi kun rumanaj esperantistoj. La 26-an de oktobro mi kun mia edzino Gabriella Stier perbuse veturis el Satu Mare en Kluĵon kaj venonttage ni pertrajne kontinuis en Gherlan. Ni loĝis kaj manĝis en hungara mezlernejo kaj en hungara kultura centro situis nia simpoziejo. En libroservo aperis novaĵo: Rumana-Esperanta Vortaro el la jaro 2022. 27 partoprenantoj de la simpozio el Rumanio (26), Hungario (1) kaj Ĉeĥa Respubliko (1), inter kiuj estis kelkaj komencantoj, aŭdis interesajn prelegojn. En libera tempo povis trarigardi la urbeton. Ankaŭ ekzerco pri esperanta gramatiko kaj malgranda teatraĵo ne mankis. Danke al lokaj esperantistoj la simpozio estis bonege aranĝita. Mi informis pri la 72-a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), kiu okazis en tiu ĉi jaro en Bjalistoko (Pollando), kaj invitis partoprenantojn de la simpozio al la 73-a Kongreso de KELI (Hungario, Vác, 3 – 10 aŭgusto 2024). Bone akceptita estis ankaŭ informo pri Universala Kongreso de Esperantistoj, kiu en la jaro 2025 okazos en Brno (Ĉeĥa Respubliko).

Ĉeesta programo, ĝi estas registrota.
**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 22-an de novembro 2023 je la 18-a h. (La klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

★

## Ni rekomendas

- La 23an — 26an de novembro, **La 4-a Virtuala kongreso de Esperanto**, rete
- La 3an — 10 de aŭgusto 2024 **Universala kongreso**, Aruŝa, Tanzanio. La plej favora prezo nur ĝis la jarfino.

★

## Cetera programo en novembro

La 29-an **Venediko** – Michał Ryszard Balicki, rete per Skajpo

## Programo en decembro

La 6-an *Ankoraŭ ne agordita*, Klubejo Hybešova
La 13-an **ZEO**, rete per Zoom, komuna renkotiĝo kun klubo Glivice
La 20-an **Antaŭkristnaska renkontiĝo**, Klubejo Hybešova

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrno.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra turo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)